FN PER ANC 47


# NORMANDA ESPERANTO - BULTENO

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

N° 25 - OKTOBRO 1973



Redaktas : Sro JOUIS - 621, rue Georges Mugnier 76 - BOISGUILLAUME


-;-;-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:

Sendu la manuskriptojn antaŭ la : 10a de Februaro - 10a de Majo - 10a de Aŭgusto - 10a de Novembro.-

## ENHAVO


- Instigo al Esperanto
- Universala Kongreso en Beogrado
- Filatelio
- Vivo de la Grupoj


+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.

## INSTIGO AL ESPERANTO

Oni plurfoje diris, en la Esperanta medio, ke nia lingvo ne estas bone konata de la ĝenerala publiko, kaj same en la kleraj medioj. Estas do devo de la Esperantistoj ĝin konstante prezenti per diversaj rimedoj.

Unu el la rimedoj kuŝas en la uzo de glumarkoj, ĝenerale verdaj, sur kiuj oni povas legi, ekz. : " Tout le monde est partisan de l'Esperanto " aŭ " TOLSTOI est partisan de l'Esperanto " ktp...

Mi uzis ilin, sed ili ne tre plaĉis al mi, pro la malfacileco surglui ilin, kaj ofte pri la tekstoj, iom infanaj, kiuj malpermesis meti ilin al multaj korespondantoj, pro timo de kontraŭ efekto.

Mi do decidis elekti mem miajn frazojn, kaj por facile apliki ilin sur la kovertojn, kaj precipe sur la leterojn mem,

.../...

..... en sufiĉe diskreta maniero; mi fabrikigis kaŭĉukajn stampilojn ĉe ordinara stampilkomercisto.

Komprenable, unu stampilo kostas iom pli ol paketo + da verdaj frezoj, sed oni povas uzi ĝin longdaŭre, rapide, sur diversaj paperoj, kaj eventuale diskrete, taktoplene, se oni skribas al eminenta korespondanto.

Ĉar la unua stampilo bone funkciis, mi fabrikigis 4 el ili, kun malsamaj tekstoj, adapteblaj al diversaj korespondantoj. Jen tiuj tekstoj :

Pourquoi s'en priver ?... puisque en quelques mois
vous pouvez maitriser l'ESPERANTO
et vous moquer de la barrière des langues

— ESPERANTO —
Une fraternité internationale.
Sans barrières linguistiques.

*Soyez modernes ! Apprenez :*
*L'ESPAGNOL, L'ITALIEN, LE PORTUGAIS*
*L'ALLEMAND, L'ANGLAIS, LE RUSSE,*
*LE SUEDOIS, L'ARABE, LE CHINOIS . . .*
*Ou tout simplement : l'ESPERANTO !*

*Il y a un bon moyen de ne pas s'entendre*
*C'est de ne pas se comprendre*
*Alors soyons bilingues :*
LANGUE NATIONALE + ESPERANTO

Mi ne uzas verdan inkon, sed [illegible] nigran. Tiam la teksto povas facile sin meti apud normale presita leterfronto, aŭ koverfronto. Ofte ĝi aperas kiel normale presita aldono.

Same kiel la politikistoj estas elektotaj nur se ili kaptas ĉiujn okazojn sin konigi al la publiko, eĉ dekoraciante meritplenajn virgulinojn, Esperanto fariĝos necesa kiam la ĝenerala publiko ĉiumomente aŭdos aŭ legos pri ĝi !

E. JOUIS -

+ pour information, au Havre :

Mon Lutry - 33, rue Jules Siegfried
ou
Mon Casut - 2, rue Madame Lafayette

environ :

| | | | |
|---|---|---|---|
| N° I | I6. F. | N° 3 | I0 F. |
| N° 2 | I7. F. | N° 4 | I6 F. |

---

ĈU VI SCIAS ...... ke en Novzelando, 990 lernantoj finis la Esperanto-kursojn en 1972 ?

(HEROLDO)

## PRI LA 58-a UNIVERSAL KONGRESO 1973 EN BEOGRAD

Ĝi okazis de la 28-a de Julio ĝis la 4-a de Aŭgusto, kun 1.400 partoprenantoj inter kiuj preskaŭ 200 Francoj ( nur 4 Normandoj : S-ino Vincent, Ges-roj Tailpied kaj S-ino Lavallée )

Franca karavano foriris de Parizo la 23-an de Julio, tra Chamonix, Milan, Venise, Zagreb, Belgrade. La etoso inter la samideanoj de tiu aŭtoĉaro estis tute simpatia, amika. La reiro okazis tra Sarajevo, Primoŝten, Rijeka, Salsbourg, Heidelberg, Metz, Verdun, Paris.

Dum la U.K., delegito el ĉiu lando, siavice sur la podio, salutis dum unu minuto la kongrasanojn el 56 landoj. Inter la teatraĵoj ĉiuj admiris dancistinoj kun mirindaj kostumoj. La U.K. bone sukcesis pri ĉiuj debatoj, kiel kutime.

Beograd estas grandega kaj moderna urbo, kiu pligrandiĝas per Novi-Beograd.

La vetero estis belega kaj varma. Ĉiuj multe ĝuis la ravan restadon en tiu Kongreso.

La venonta U.K. okazos en Hambourg.

H. LAVALLEE -

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## FILATELIA RUBRIKETO - Eldono de francaj poŝtmarkoj -

- 20-8-1973 : Eldono de p-m. je 0,90
  Kastelo de Gien (turista serio )
- 10-9-1973 : Eldono de p-m. je 0,60
  Salto de Doubs ( turista serio kutima uzado )
- 24-9-1973 : Eldono de p-m. je 2 F.
  Verko de Watteau " La Fi[illegible] "
- 1-10-1973 : Eldono de p-m. je 0,45 - Centjarfesto de la malkovro de la lepra bacilo (portreto de Dro Hansen)
- 8-10-1973 : Eldono de p-m. je 0,50 + 0,10
  Pasteur (serio famaj eminentuloj )
- 8-10-1973 : Eldono de p-m. je 1 F. - Sepdekkvina datreveno de la kunigo T.S.F. " Eiffel turo/Panthéon -

M. BETTENCOURT -

# V I V O  D E  L A  G R U P O J

**- GRAND QUEVILLY -** Dum tiuj lastaj monatoj, nia Grupo el laika amikaro Bastié, Calmette, Salengro, iom vekiĝis. Ĝi faris propagandon por nia internacia lingvo per distribuo de flugfolio kaj per artikoloj en la loka gazeto " Signal " al la loĝantaro de la komunumo. Ĝi starigis laborplanon por posttagferia tempo.

Inter aliaj aferoj, ĝi projektis malfermi lernejon ek de Septembro sub gvidado de S-ro Petro Quillaud. Ĝi decidis kontakti la aliajn esperantistojn de la Ruena regiono kaj gardi kun ili ligiteron sed la plej grava afero estis : inviti la proksimajn kongresajn de UNE kaj de Normanda Federacio de UFE dum Aprilo 74, en Grand Quevilly. Kiel vi vidas estas multe da pano sur breto por la Grupanoj.

P. JOUVIN -

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

**LE HAVRE -**

" FRANCE CULTURE " dum dimanĉo la 7a de Oktobro, elsendis duonhoranprogramen " Esperanto " je tre konvena horo : 13 H 45. Lerta prezento de la lingvo kaj de ĝia historio, agrabla aŭdo de kantoj, kaj poste enketo okazinta en Gresiliono lastan Aŭguston. Tie la internacia etoso estis varme sentata, kun intervjuoj de eksterlandanoj, komunaj diskutoj kaj kantoj ...
Gratulon al la organizintoj de tiu elsendo kiu estas vere sukcesa kaj grave helpos la propagandon de la Grupoj dum tiu epoko de malfermo de Kursoj.

J. GIBAUX -

---

**INTERVJUO -** S-ro LENTAIGNE, el Montpellier, konata pro sia agado en la Lerneja Movado Freinet, trapasante Le Havre, vizitis S-ron Chalm, delegito pri Informado : nia dinamika amiko intervjuis lin kaj " rikoltis " valorajn informojn por la plenumo de niaj agadoj....

---

SUKCESOJ :
--------- En la lasta Bulteno, vi povis legi anoncon pri la konkurso de Pola Radio .... Ĉu vi provis ĝin ? Notu bone ke la unua premio (IO taga restado en Polujo) estis gajnita de Franco : S-ro L. Giloteaux kaj la Dua premio iris al nia Samideano A. Chalm en Le Havre. Konklude ; aŭskultu atente Radion Varsovio kaj provu la venontan konkurson... Ĉu ni havos iam la plezuron iam anonci sukceson de Normando ?

---

URBA BIBLIOTEKO :
---------------- Novaj Esperantaj titoloj estas disponeblaj. -

---

KURSOJ :
------ Grupo de Radio-Amatoroj : oni povas legi en la tagordo de ties Generala Kunveno : " Organizado de Esperanto-Kursoj " .-

Liceo " Oceana Pordo " : konversacia kurso ĉiuvendrede I9 H I5 / 20 H 30

M.J.C., 2 av. Foch, kurso por k[illegible]antoj ĉiumarde I9 H I5 / 20 H 30

Liceo " Raoul Dufy " : baldaŭ : unua grada kurso -
Liceo " Caucriauville" "-" "-"
Sokuristoj de la
Ruĝa Cruco : "-" "-"

------------------------

---

Pardonpeto.-
------------ Tiu bulteno aperis longatempe post la normala dato. Bonvolu pardoni al ni pro tiu malfruo : la ronéo-maŝino kaj la maŝinantino estis malsanaj !

La maŝinantino estas duone "[illegible]rita " sed la maŝino estas tute riparita post restado en Parizo por ŝangi kaŭcukon de la cilindro.

Do, fine, jen nia Noramnda Bulteno !

N.P.

---

La Havra Grupo funebras :

Fraŭlino Amiard, Honora Prezidantino de nia Grupo forpasis la I5an de Septembro, atingante 85 jarojn.

La Havraj Gesamideanoj kiuj konis ŝin memoros kun korpremo ŝian dinamikecon, ŝian propran manieron gvidi Esperanto-kursojn, kun arto tuj paroligi la lernantojn.

Ni konis ŝin ĉiam preta aktivi kaj helpi. En kiom da porpacaj movadoj ŝi aniĝis, helpis, klopodis !

Certe, multaj membroj de UNE kortuŝite memoros pri la ĉiam ridema vizaĝo, la vortfacila babilemo de nia optimista kungrupanino, kaj ŝiaj vivparolaj partoprenoj dum la kunvenoj !

Dankon al VI Fraŭlino AMIARD, pro via optimismo en la Vivo, via fideleco al Idealo de Paco, kaj sincera Amo al la Homoj ...

---

Lasminute, ni ekscias pri la forpaso de S-ino Letailleux el Sanvic. Certe, pluraj Normandoj memoros pri niaj samideanoj Letailleux kiam, antaŭ kelkaj jaroj ili ankoraŭ povis ĉeestis renkontojn. Nia simpatia amiko S-ro Letailleux, ricevu tie niajn sincerajn kondelencojn.

---

ĈU VI SCIAS ??
---------------

.... ke en Usono estas eldonata la plej ampleksa Esperanto-kurso sur diskoj ; I4 lecionoj sur I4 longdaŭraj diskoj instruas Esperanton al anglalingvanoj.

(Heroldo)

.... ke la grava franca eldonejo " Presses Universitaires de France " ĵus publikigis en sia serio " Que sais-je " sub N° I5II, I26 paĝan eseon pri la Internacia Lingvo " L'Esperanto ".

(Heroldo)

.... ke en la plej luksa hotelo en Lieĝo (Belgujo) esperantisto deĵoras kiel interpretisto.

(Heroldo)

---

PLACE (extensible...)

réservée aux articles que, de toute la Normandie, tous les Grupoj ou les Samideanoj isolés voudront bien nous faire parvenir.... !

Merci à l'avance.

N.P.

---

## - U N E -

**KONGRESO EN 74 -**

La I4an de Oktobro kunvenis en Grand-Quevilly la estraro de U. N. E. kun partopreno de S-ino Vincent. Temis pri organizo de komuna kongreso : U.N.E. + Federacio Normanda de UFE.

La loka Kongresa Komitato konsistas el dinamikaj samideanoj el Grand-Quevilly, urbo kie okazos tiu Normanda renkonto dum la I6a kaj I7a de Marto I974.

Kompreneble, detalaj informoj sekvos en la estontaj bultenoj sed oni flustras jam ke la programo estos alloga ....

... bone notu la daton !


J.G.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

**Ĉu vi scias ??**

..... ke ĉe la Eŭropa Kongreso en Londono (II/I3 de Majo) grupo da esperantistoj informis la I.000 diversnaciajn manifestaciantoj partoprenantojn pri la Internacia Lingvo.

(Heroldo)





T. LECOQ

Mia nomo estas PLORUL

Mi estas malgaja

Mi ne havas amikojn

Mi ne konas Esperanton -

Mi estas RIDUL

Mi estas optimista

Suno kaj bonhumoro estas miaj simboloj

Mi parolas Esperanton !

---

ĈU VI SCIAS ? ?

.... ke la Brita Parlamenta Grupo por Esperanto kunvenis por la dua fojo.

---

Polycopié par le

GROUPE ESPERANTISTE HAVRAIS

DEPOT LEGAL :

3ème trimestre 1973

La Gérante : N. Peltier -